# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

PLENUMITA 11/07/2024 sescentnaŭdekkvina eldono (unua eldono 26/09/2011)



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan auskultadon kaj legadon Ĉiun tagon

Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**Ĉu plantoj estas inteligentaj?** 6a de julio 2024 (*Roger Springer*)

# Ĉu pozitivaj ŝanĝoj?

Ĉi-matene kiam mi iris al la banko ANZ en Lilydale por eltiri monon el la aŭtomata giĉeto , mi havis la surprizon konstati ke ĝi malaperis . Tie estis afizo anoncante liberan lokon por interesita kandidato. Unu banko pli malaperis! Ni ja estas sur la vojo al interŝanĝo sen uzo de fizika mono, do al totala kontrolo almenaŭ de la bankoj pri la uzo de nia mono. Tio ne ĝojigas min. *Franciska Toubale*






En angulo de la aŭtorestigejo mi ankaŭ malkovris novan konstruaĵon, kie homoj vicis, portante korbojn, skatolojn plenplenajn de plastaj boteloj kaj ladskatoloj. Sur la supro de la muro mi legis ke por ĉiu botelo aŭ ladskatolo estas redonita 10 cendoj. Tute klaris ke homoj opinias ke estas por ili bona plano. Ĉu la registaro sukcesos tiamaniere purigi la fosaĵojn kaj venki en la militoi kontraŭ plasto? Eble necesas pli da tiu ejoj por krei kutimon.




Ni esperu! *Franciska Toubale*

# Responde al la teksto de Peter Weide



Mi ne opinias ke homoj hontas esti esperantistoj kaj pro tio intence ne surmetas pinglojn aŭ T- ĉemizojn, kiuj reklamas Esperanton. Ŝajnas al mi ke tio ne estas konduto nur de la esperantistoj, sed pli ĝenerala sinteno. Mi ja agnoskas ke la lernejanoj ankoraŭ surmetas uniformojn por iri al la lernejo, sed multaj el tiuj signoj de aparteno al iu klubo, grupo, malaperis. Ĉu necesas trudi siajn ŝatojn kaj vidpunktojn al la aliaj aŭ pli bone resti pli diskreta . Kiam bezono estas sufiĉe forta, finfine venas solvo , male pro manko de intereso multaj signoj ne estas rimarkitaj . Amike *Franciska Toubale*

## Ĉu mono regas la mondon?



Unu konsidero por Truman kaj la uzo de la atombombo estis ke se li ne uzis ĝin, la tuta mono elspezita estus dirita estinti malŝparita (milionoj mortis) *Roger Springer*

# El Adelajdo



La julian Zoom-an kunvenon de adelajdanoj partoprenis naŭ personoj. La preleganto de la kunveno estis Andrew Woods. Li parolis interese pri geometrio. Amike *Katja Steele*

## VIDU PER FILMETO KION FARAS LBV POR EDUKADO!

**Bona Volo**







Vidu per filmeto kion faras LBV por edukado!

Ni, skipanoj de Eo-fako de Legio de Bona Volo (LBV), preparis por vi aferon mirindan: filmeton pri la ĉijara granda kampanjo de tiu institucio, por valorigo de edukado ĉe la malriĉa popolo. Tiu video kun esperanta voĉo kaj subteksigita, montras plurajn, kortuŝajn kaj sencoplenajn scenejojn tra la bela Brazilo. Do nepre ĝin spektu, ĝuu kaj lasu vian komenton.